

N°187
juillet
août
septembre
2019

LA INFORMILO

N° 187
julio
aŭgusto
septembro
2019

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2019
Justa komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison de Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges "

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



Saluton el Italio



ITALIE: DES CONGRÈS NATIONAUX EXEMPLAIRES

Traditionnellement les congrès mondiaux de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA) réunissent pendant une semaine des centaines – souvent des milliers – d'espérantophones des cinq continents qui bénéficient à côté des réunions de travail d'un riche programme culturel international et d'excursions dans le pays d'accueil. Depuis quelques années la dynamique Association Italienne d'Espéranto propose à ses membres **un congrès national d'une semaine** digne du congrès mondial auquel sont également invités les espérantophones étrangers. En cette année 2019 ce fut la ville de TRIESTE, au bord de l'Adriatique, qui a rassemblé 246 congressistes d'une trentaine de pays.

Grâce à l'association TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) ils ont pu déguster et emporter des paquets de polenta, la spécialité locale. Une collection de recettes leur permettra d'en varier la préparation.



En ĉi-jara julio okazis sinsekve pluraj Esperanto-aranĝoj kun varia nombro da partoprenantoj.

BET-55 en Litovio, ILEI-kongreso en Ĉaĉako, Serbio kaj UK en Lahtio, Finnlando.

Jen Liba raportas pri "Baltiaj Esperanto-Tagoj-55".



Baltiaj Esperanto-Tagoj bonvenigis nin per pluv-sun-venta vetero. Ili estas internaciaj aranĝoj kun altnivelaj programeroj kun simila enhavo kiel la Universalaj Kongresoj. BET-oj okazadas laŭvice en Estonio-Latvio-Litovio. Ĉiutage aperis riĉe ilustrita kvarpaĝa kuriero ABELO, redaktita de Stano Marček. Per ĝi ni estis informitaj pri diversaj okazaĵoj, aperis listo de novaj aliĝintoj, taga programo kaj manĝmenuo. Li ankaŭ kompilis belan BET-libron kun multaj utilaj sciigoj kaj raportoj de ĉiuj jam okazintaj BET-aranĝoj en Litovio.

Aliĝis 425 esperantistoj el 37 landoj. Tamen kelkaj ne povis alveni pro diversaj kialoj. Laŭ la nombro de partoprenantoj la ĉi-jara BET estas la plej impona lastatempe. La 6-an de julio Litovio festas Nacian Tagon. Estas kutimo kanti la himnon (nacian Glorkanton) je la 9-a horo vespere ie ajn en la mondo,

kie troviĝas litovoj. Do, same okazis dum la BET-55 post la vespera koncerto de Natalia Bertse.

La solena inaŭguro okazis la dimanĉan posttagmezon en la kultura centro de Panevėžys kun la ĉeesto de la urbestro s-ro Rytis Raĉkauskas. La prezidanto de la litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas bonvenigis ĉiujn partoprenantojn bondezirante sukceson al la evento. Biruta Rozenfelde estis iniciatinto de BET-oj antaŭ sesdek jaroj. Post la prezentado de diversaj salutvortoj, artaj folkloraj grupoj de la urbo prezentis belegan spektaklon de kantoj kaj dancoj. Poste okazis por ĉiuj riĉa urbestra akcepto.

La programo de BET-55 estis varia kaj riĉega. Ne eblas menciigi ĉiujn programerojn, ĉar unu paĝo ne



sufiĉus. Okazis sinsekvo da prelegoj de Somera Universitato, de SUS-36 (Sanmarineca Universitata Sesio) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) pri kiu eblis aĉeti IKU-libron. Interesaj estis ankaŭ aliaj prelegserioj pri diversaj temoj.

La partoprenantoj povis ekkoni la historion de la litova lingvo kaj ĝian kulturon fare de Aloyzas Gudavičius. Pri spacteleskopoj informis Amri Wandel, pri religio kaj sociologio de Esperanto Walter Ŝelazny. En prelegserio de Márkus Gábor "Ĉu Esperanto plibonigas/plibonigas la mondon?" ni provis trovi la respondon. Preleg-serio de Orlando Raola temis pri "Media kemio", medio-protektado en la hidrosfero, ter-krusto, biosfero. La preleg-ciklon pri "Lingvo kaj kulturo" prezentis Ilona Koutny.

Pri la azia movado informis Lee Jungkee, pri historia E-movado en Ĉinio kaj instruado en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj kaj pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio donis informojn Gong Xiaofeng (Arko). Amuze kaj serioze pri diversaj karakteroj de Esperanto parolis Aleksandr Melnikov. Baŭhaŭsan artan stilon prezentis Peter Kühnel. Pri "Zamenhofaj objektoj" parolis Robert Kamiński. Li ankaŭ iniciatis kaj instalas interesan ekspozicion de Zeoj. La mondon de fabeloj kaj diversaj herooj prezentis Anna Striganova. Pri la eldonejo Impeto, pri la Reta Revuo de Esperanto, pri modernaj sociaj retoj kaj Esperanto parolis Dima Ŝevĉenko. "Ĉu muziko povas kuraci?" kaj kiamaniere tio okazas klarigis Pavla Dvořáková. Pri "Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj" informis Manfred Westermayer. Pri gravitaj ondoj parolis Alfred Heiligenbrunner. Intelektajn ludojn prezentis Tatjana Auderskaja. Kanadanoj varbis por venontjara UK en Montrealo.

Ĉeestantoj spektis la filmon "Litvo-Patrujo mia" de Roman Dobrzyński. Okazis kunveno de ĵurnalistoj kaj aŭtoraj horoj kun Mikaelo Bronŝtejn kaj Tatjana Auderskaja. Estis lanĉita nova eldono de "Baza literatura Krestomatio". Riĉa estis la libroservo, okazis interesaj kvizoj, por Di-kredantoj okazis Meso. Admirinda estis la ekspozicio de pupoj de Anna Striganova. Kortuŝan prezentadon montris sepjaraĝaj infanoj de la urba infanĝardeno "Puriĉna" laŭ la slovena popola fabelo "Paŝtisteto".

La diversnivelaĵoj Esperanto-kursojn gvidis la jenaj instruistoj: Stano Marček el Slovakio, Nina Petuchovska el Pollando, Abdurachman Junusov el Dagestano,



Anne Jaussions kaj Françoise Noireau el Francio, Svetlana Smetanina el Rusio, Mikaelo Lineckij el Ukrainio.

La oferto de la esperantista arta programo estis varia kaj tre riĉa. Okazis ĉiutagaj posttagmezaj kaj vesperaj koncertoj. Kun granda sukceso kaj aplaŭdo koncertis por ni la konata litova familia grupo "Sepa kaj Asorti", Kaŝi el Germanio, Amira Chun el Koreio, Jogaile Ĉojute el Litovio, Mikaelo Bronŝtejn el Rusio akompanata de Sergej Straŝnenko (LaTerura) ankaŭ el Rusio, Zuzana Kornicka el Pollando. Violonis Françoise Noireau el Francio. Belsonis ankaŭ kantoj el Ukrainio.

Dum la adiaŭa vespero prezentigis niaj talentuloj. Ni ĝuis Esperanto-kantojn el Ukrainio, Svislando, Ĉeĥio, Rusio, Pollando, korean dancon, poemon de knabino Daŝa el Rusio. Ventro-dancadon prezentis litova junulino. Mikaelo Lineckij reĝisoris la programon kaj prezentis la artistojn.

Neforgesebla estis la tuttaga ekskurso al la urbeto *Birzai*, kie ni en kastela muzeo gustumis bieron, ekkonis ĝian fabrikadon kaj ĝuis muzikan prezenton. Poste ni daŭrigis la busvojaĝon al regiona parko, kie eblis supreniri rigardejon en formo de ŝipo kaj fine en urbeto ni *Pakruojis* ni bonguste tagmanĝis kaj promenis en bienpalaca ĝardeno admirante belegajn flor-komponaĵojn. La duontaga ekskurso gvidis nin al bieno de aromaj plantoj, kie ni

mem pretigis infuzaĵon el ili kaj gustumis lokan mielon kun fromaĝo.

Solena fermo okazis la 13-an de julio. Estis prezentita statistiko pri BET-55, disdonitaj atestiloj al sukcesintaj ekzamenitoj, rozoj al ĉiuj LKK-anoj kaj helpintoj.

Koran dankon al litovaj esperantistoj, kiuj multe laboris por sukcesigo de BET-55 kaj al multaj eksterlandaj gastoj, kiuj kontribuis al la aranĝo per diversaj eroj.





La 52a Kongreso de ILEI Ĉaĉako, Serbio, la 13-20-aj de Julio 2019

En la semajno antaŭ UK okazis tute oportune ILEI-kongreso en la urbo Ĉaĉako en Serbio, en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj, apartenanta al la Universitato de Kragujevac.

La komitato elektis tiun urbon pro diversaj kialoj:

La iam tre vigla kaj nun perdinta la forton la Esperantomovado en sudorienta Eŭropo, kaj precipe en Serbio, bezonas kuraĝigan impulson. Serbio iom longe restas relative nekonata de esperantistoj kulture, turisme kaj gastronomie, do malkovrinda. Serbiaj vizitoj ne estas bezonataj por turistoj el multaj landoj kaj la viza reĝimo de Serbio povas esti pli oportuna por kongresanoj el Afriko kaj sud-orienta Azio ol kiam oni vojaĝas en aliajn ŝtatojn de Eŭropo.



La organizantoj proponis antaŭkongresajn ekskursojn en Beogrado, al kiuj aliĝis deko da personoj. Bedaŭrinde tiam la profesia ĉiĉeronino parolis angle.

Traveturante la urbon eblis vidi spurojn de la lasta milito, detruitajn partojn de konstruaĵoj. Rememorige ili ŝajne estos tiel lasitaj.

Sur apuda monto ni vizitis la maŭzoleon de Tito kun multaj historiaj rememorigoj.

Tagmeze ni unue vizitis trinkejon kaj nur poste restoracion ĉe Danubo.



La 13an de julio aŭtobuso veturigis plurajn partoprenantojn al Ĉaĉako, nia kongresurbo.

Ĝi troviĝas je 140 km sude de Beogrado kaj survoje ni vizitis sur monto Avala la altan televidan turon kaj observejon kun bela panoramo al Serbio



Ni eksciis pri multaj historiaj eventoj de tiu regiono Ŝumadio, kiu suferis dum 4 jarcentoj la Otomanan okupadon. La muzeo pri la ribeloj troviĝas en la vilaĝo Topola, en la konstruaĵo de elementa lernejo.

Guste tie startis la Unua Serba Ribelo kontraŭ Turkio organizita de Karaĝorĝe en 1804. La dua okazis en 1815, per kiu praktike komenciĝis la definitiva liberigo de la lando kaj kreado de moderna Serbio.

En Oplenas estas domo de la reĝo Petro la 1-a Karageorgijeviĉ kaj la privata preĝejo kaj familia maŭzoleo de sankta Georgo.



Jen ni alvenis al Ĉaĉako kaj estis akceptitaj en la studenhejmo.

En la sama vespero jam estis pretigita en la restoracio la "Frاندvespero", tre ŝatata tradicio de ILEI-kongreso. Tiam kongresanoj kunportas sian specialaĵon, manĝaĵojn, trinkaĵojn kaj ilin proponas al ceteraj gastoj. Sed ŝajne plej multaj estis proponitaj de lokuloj. En tiu vespero multe pluvis, tiom ke malfacilis forlasi la konstruaĵon kun sekaj piedoj. Ĉu vadi tra la akvo aŭ trovi teknikan solvon.

Dimanĉe jam pli agrablis la vetero kaj taŭgis por aŭtobusa kaj ŝipa ekskurso al monaĥejoj, kvazaŭ kaŝitaj en profundaj valoj. En tiuj lokoj, for de urboj, la monaĥoj sukcesis konservi dum jarcentoj la tradiciojn kaj la serban kulturon inkluzive la serban lingvon.



Nia aŭtobuso serpentumis tra tiuj valoj kaj atingis la unuan klostron.

Poste estis proponite transiri la riveron sur pendanta ponto. Pluraj kuraĝuloj aŭdacis kaj atingis la alian flankon. Ni plu-veturis al monaĥeja restoracio, kie bongustis kaj abundis la diversaj proponitaj manĝaĵoj. En la posttagmezo ni atingis trankvilan



riveron ĉe iu val-baraĝo. De sur katamarano eblis admiri la imponan kaj mirindan pejzaĝon en tiu montaro.



La nacia vespero plene kontentigis la kongresanojn, kiuj spertis kaj ĝuis en la teatrejo la lokan kulturon. La virina kant-grupo "Ĉaĉanska lira" (Liro de Ĉaĉak), bele kantis kaj kaptis la atenton de la publiko.



Alia kontribuo estis la infana folkloro grupo "Bambi" el 6 knabinoj kaj 6 knaboj. Ili vigle kaj gaje dancis en belegaj buntaj kostumoj.


Aparte ŝatata estis la juna akordeonisto, kiu akompanis la kantistinojn.





Ivo ANDRIĆ iama Jugoslava verkisto, la aŭtoro de la romano "La ponto super Drino" estis distingita per Nobel-premio pri literaturo. Li naskiĝis en 1892 en Dolac en Bosnio kaj mortis en Beogrado en 1975.

Estis prezentita lia verko, nun ankaŭ en Esperanto, en ĉeesto de lia edzino. **La ponto super Drino** troviĝas en Višegrad en apuda lando en Bosnio-Hercegovino.



Nia tuttaga ekskurso ĝuste celis viziti tiun urbon.

Tamen antaŭ ol atingi tiun lokon, ni vizitis survoje subĉielan muzeon sur monto-flanko. Tie staris ĉefe lignaj domoj, bele konservitaj, ilin konstruis kinodirektoro Emir Kusturica.

Ja necesis prezenti pasporton por transiri al Bosnio-Hercegovino. En Višegrado eblis admiri la realan ponton super la rivero Drino.



Jen la fama reala ponto super Drino kaj la grupo da ekskursantoj



En la restoracio apud la rivero eblis agrable tagmanĝi, kun vido al la ponto kaj al la mirinda pejzaĝo.

Jen nova lando, sed similaj lingvoj, bosnia, serba kaj kroata, tamen alia mono: KM Konvertebla Marko.


Ni tamen povis pagi per dinaroj kaj eŭroj



La rivero Drino serpentumas tra krutaj klifoj en preskaŭ senhoma montaro. En la posttagmezo ni agrable ŝip-veturis sur Drino dum pli ol 3 horoj. Trankvila navigado en mirinda pejzaĝo.

Kiam ni alproksimiĝis al Serbio la pejzaĝo iom ŝanĝiĝis kaj aperis ĉarmaj ligno-domoj laŭlonge de la rivero-bordo. Malgraŭ refoja dogana kontrolo, ni pasigis tre agrablan tagon en kvieta pejzaĝo.

Restis iom longa veturado ĝis Ĉaĉako.





En la du lastaj tagoj de ILEI kongreso okazis la 58-a AMO-seminario. Pri ĝi raportas Nina Danylyuk el Ukrainio.

Enkadre de la kongreso okazis la 58-a AMO-seminario kun la temo “Esperanto – kiel konigi ĝin, kiel instrui ĝin”, en kiu kontribuis prelegoj de Mirelle Grosjean pri la agado de ILEI kaj UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, de Duncan Chartes – pri la reta programo Duolingo, de Stefan MacGill – pri la unika verb-sistemo de Esperanto kaj instruado de E-verboj k.a. Dum tradicia Lingva festivalo (la 16-an de julio) sub gvido de Elena Nadikova estis prezentitaj deko da lingvoj, inter ili indiĝenaj. Mi rakontis pri la ukraina lingvo kaj kulturo.



La 18-an de julio komenciĝis la scienca konferenco “Lernado en virtualaj komunumoj”, malferma por esperantistaj kaj neesperantistaj universitatanoj. La laborlingvoj estis Esperanto, la serba kaj la angla. La solenan malfermon partoprenis la urbestro, la dekanino kaj la instruistoj de la fakultato pri Teknikaj sciencoj. Ĉefprelegojn prezentis: Daniela Milošević kaj Marija Blagojević “Mafermaj edukiloj en lern-komunumoj” (en la serba kun bonega E-traduko de Radojica Petrović), Duncan Chartes “Instruado de lingvoj kaj kulturoj en virtualaj medioj” (en Esperanto kun laŭbezona memtraduko al la angla). La konferenco enfokusigis ankaŭ la lingvolernadon dediĉe al la jaro 2019 – Internacia Jaro de indiĝenaj lingvoj per du sekcioj: “Lerniloj kaj teknologioj en virtuala medio”, “Interkulturalismo kaj lernado de lingvoj en virtualaj komunumoj”. Pro granda intereso al la prelegoj ambaŭ sekcioj laboris kune. Komence oni prelegis kun paralelaj tradukoj, sed poste serbaj instruistoj diris, ke ili jam bone komprenas E-n. Do, la prelegantoj libere parolis kaj diskutis E-e, serbe kaj angle kun nur laŭbezona traduko. Dum la dua tago okazis ateliero “La mondo tra infanaj okuloj: IT kaj E en interkultura komunikado de lernantoj” kun interesaj prezentaĵoj de Aranka László (Serbio) kaj Grażyna Szybryczyńska (Pollando) pri lerneja kunlaboro.



Saša Pilipović en la teatraĵo pri Galileo

Dum diskut-rondo la serbaj instruistoj substrekis sian kontenton aŭdi pri la uzo de virtualaj rimedoj en universitatoj el diversaj mondopartoj. La konferenco grave videbligis Esperanton kaj ILEI en la serba Universitato en Kragujevac. Pro tio multaj instruistoj venis por la ateliero “Esperanto por komencantoj” (2 partoj), kiun gvidis Radojica Petrović. Fine de la kongreso esperantistoj, kiuj partoprenis divers-nivelajn kursojn sub gvido de Aurora Bute kaj Mihai Trifoi, ricevis la diplomojn.



Estis akceptita la Kongresa rezolucio, kiu alvokas diskonigi kaj utiligi la elektronikajn rimedojn por distanca lern-apogo, bonvenigas novajn universitatajn interligojn k.t.p. La ĉeestantoj konstatis, ke 70-jara ILEI devas evolui laŭ la evoluo de la nuntempa mondo, konsiderante la bezonojn de ĝiaj membroj.

Resume mi diru, ke jubilea la 52-a ILEI-kongreso 2019, kiu okazis en bela lando Serbio kaj pitoreska intermonta urbo Ĉaĉak, estis tre sukcesa, pasis en bonega amika etoso. Dankon al la Loka Kongresa Komitato: Radojica Petrović, Aranka László, Blanka László kaj Nebojša Stanković pro granda laboro!

Nina Danylyuk, profesoro de Lesja Ukraina Orienteŭropa Nacia Universitato, estro de ukraina ILEI-sekcio (Ukrainio).



Okaze de bankedo en ĵaŭda vespero la parotprenantoj ĝuis tre bongustan manĝon en ege agrabla etoso kun muziko. Por festi la 70-jariĝon de ILEI, estis proponita al la gastoj kuko kun la surskribo

"ESPERANTO KAJ EDUKADO"
"ĈAĈAK 2019"



La semajno finiĝis kun la koncerto de Saša Pilipović kaj lia frato per ciganaj kantoj.

Aparte ŝatataj estis la dancoj kaj kostumoj prezentitaj de la korea teamo.

Krome Xosé (ŝose) prezentis la kongresan kronikon, humore kaj muzike.

Kaj ĉiuj dankis pro la bona organizado de tiu kongreso en Serbio.

Andreo



Espéranto France-Est http://esperanto.france.est.free.fr.				Orient-Franca Esperanto-Asocio.	
La Informilo		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO	
Rédaction: Redaktoro:		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
Komitato de la Asocio			Comité de l'Association		
Funkcio		Adreso		Telefono	
Ret-adreso		Telefono		Ret-adreso	
Prezidanto <i>Président</i>		S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR		03.89.77.52.56 esperanto.eludwig@orange.fr	
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>		S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY		03.83.47.41.36 06 76 54 77 78 liliber54@yahoo.fr	
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		09.86.38.78.61 andreo.ag15@sfr.fr	
Libroservo <i>Service Librairie</i> Vic-prezidanto		S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE		03.83.53.57.54 jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net	
Aliaj komitatanoj		S-ro Robert KUENY		09.71.31.37.62 kueny.robert@orange.fr	
<i>Assesseurs</i>		S-ino Micheline COLNOT		03.83.27.46.93 michelinecolnot@orange.fr	
		S-ro Jacques HERLÉ		03.87.01.00.39 jacques.herle@laposte.net	
		S-ro Michel Basso		03.89.80.86.12 clbm@orange.fr	
		S-ino Gisèle BERTAPELLE		03.83.56.17.37 06.80.68.94.78 bertapelle.gisele@wanadoo.fr	
		S-ino Catherine HEL		03.83.47.63.07 cathello@laposte.net	
		S-ro Gilbert STAMMBACH		06 87 40 01 16 gilbert.stammach@gmail.com	
		S-ro Hervé KIEFFER		06.21.09.19.98 kiefferherve@gmail.com	
Abono al La Informilo →		18 eŭroj		reta abono: 7,50 eŭroj	
← <i>Abonnement à La Informilo</i>					
Pagoj per ĉeko je la nomo de →		Esperanto France-Est		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>	
Pagoj per ĝiro al jena konto →		CCP 1997 72 W NANCY		← <i>Paiement par virement au compte</i>	
Per internacia ĝiro →		IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY			
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	
1. Itala kongreso en Trieste		15. Mediteranea Semajno		<p align="center">ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i></p>	
2. BET-55 en Litovio		16. Staĝo + Luminesk + Benino			
3. BET-55 en Litovio		17. SAT-kongreso en Hispanio			
4. ILEI-kongreso en Ĉaĉako		18. SAT-kongreso en Hispanio			
5. ILEI-kongreso en Ĉaĉako		19. Itala kongreso en Triesto			
6. ILEI-kongreso en Ĉaĉako		20. Enigmoj + anekdotoj			
7. ILEI-kongreso en Ĉaĉako		21. BET-55 en Litovio			
8. ILEI-kongreso en Ĉaĉako		22. BET-55 en Litovio			
9. Komitatanoj kaj enhavo		23. UK en Lahtio Finnlando			
10. Angulo de la prezidanto		24. UK en Lahtio Finnlando			
11. Avula angulo (sekvo)		25. UK en Lahtio Finnlando			
12. Esperanto-himno		26. UK en Lahtio Finnlando			
13. Libro-servo		27. Tuttaga ekskurso al Gorizia			
14. Bavelo-seminario en Lörrach		28. Nia foto-paĝo			



Karaj gesamideanoj,

Mi supozas, ke vi ĝuis vian dumsomeran esperantumadon. Vi ja scias, ke LA INFORMILO volonte publikigos viajn impresojn. Ne hezitu sendi al ni tekstojn kaj fotojn.

Ni esperas, ke vi ankaŭ daŭre subtenos niajn diversajn Esperanto-asociojn, kiuj zorgas pri la vivo de nia movado. Regule aŭdiĝas eldiroj, kiuj anoncas la finon de la asocioj dank'al la reto kaj al firmaoj, kiuj baldaŭ pli profesie organizos la movadon.

Ĉu vi samopinias? Interesus nin koni vian opinion. Skribu al ni. Eble vi ŝatos diskuti pri tiu temo dum la baldaŭa seminario en Lörrach, kiun – kiel kutime – organizas niaj bonvolemaj germanaj samideanoj. Ĝis tiam!

E. L.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2020 ĝis 2022

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2019, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2020	2021	2022
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA 2020	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon Esperanto papere			74 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2020 por 1208				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2020, 2021 ktp. Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.				
	3. Per internacia aŭ reta ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				
	4. Al UEA-konto de TAKE ekat-i (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

AVULA ANGULO

Armand HUBERT ... *aflugas rememoraĵoj*



RESTARIĜO POST KRUDA DRONADO

La Dua mondmilito miamense plupezas.

En septembro 1939 multaj vilaĝoj situantaj inter defendo-linio "Magino" kaj la landlimo kun Germanio estis forlasitaj por eskapi al minaco de malamika invado.

Pro tio mia familio kun la avo forlasis sian hejmon, sian brutaron kaj havaĵojn. Ni iĝis migrantoj, senhavaĵuloj, rifuĝintoj, al kiuj oni forprenis ĉian vivcelon. Miaj inaj famili-responsuloj estis tridekjaraĝaj; la jun-viroj ja fore milit-soldatis. Terura bato surfalis popolaron per ĉiuspecaj mankoj.

Unue migradis la vilaĝanoj piede kaj perĉarete, poste per trajne. En var-vagonoj, sen fenestro, nek necesejo "por 8 ĉevaloj aŭ 16 soldatoj".

KUNE, TAŬGE.

Noktas en la vagono. Obseda rul-bruego de la trajno. Mi vekiĝas kaj singardeme moviĝas. La pajlo de kuŝejo bruetas je ĉia movo. Patrino mia kuŝiĝas najbare; ŝajne ŝi dormas. La vagona pordo estas iomete malfermita. Ĉee staras mia avo kun la najbaro, la "samĉambrulo", kiu estas la vilaĝestro. La du viroj rigardas la preterpasantan pejzaĝon. Ili silentas: nenio elŝanĝinda. Sed iaj pripensoj, neprecizaj kiel la nokta horizonto, zorgigas ilin ambaŭ. "Bona Dio! . . . Kien do for ni iros? Kiel tiu kruc-vojo finiĝos? Ĉu nia kuraĝo sufiĉos por ĉion elteni?" Neniu dorm-kapablo. La avara pail-tavolo ne gravas, ne malhelpas, sed la obseda taktado de la trajno kaj la punkto en fermita vagono kaj la limigita aero kaj tiom da demandoj sen respondoj.

Jen ĝemo aŭdiĝas. La du viroj samtempe turniĝas, esploras la ombron. En la pajlo, maldekstre, la familio de vilaĝestro; dekstre, tiu de avo. Nu, ĉio ŝajne pacas.

Tagiĝas finfine. Okazas streĉa bruo de la bremsoj. Grandega ŝoko skuas la dormantojn. La entrajna kompanio malmilde vekiĝas partigante la samajn agresojn. En nia dormejo, ni bontagas unu la alian: ĉu ĉio glatas? Ridetas unu al la alia, kiel najbaroj, kiuj travivas la samajn ekstravagancojn?

Ni dormis plene vestitaj kaj niaj ŝuoj ĉe la piedoj trovis tempon por surplanke forgli. Ĉiu serĉas siajn proprajn; rido akompanas la komentojn.


Nun aŭdiĝas voĉo. Obeema voĉo proksimiĝas laŭlonge de la konvojo: "WC! Neceseje! Virinoj dekstre, viroj live! Malantaŭ la heĝo." La afero okazas sur la ununura trako de la fervojo. Laŭ la trajno homoj desaltas, infanoj ekkrias, ridas. La balasto plen-plenas je viroj kaj virinoj, kiuj malaperas malantaŭ la asignita heĝo.

Mia patrino invitas: "Iru! Faru vian kakaĵon!"

Ĉu same kiel ĉiuj?

Trans la heĝo, la vira pasaĝeraro desuprenigis sian pantalonon. Proksime al mi, la urbestro kaŭriĝas: li klopodas je sia afero. Maldekstre, mia avo. Li invitas min: "Venu karulo! Elektu lokon proksiman al bela tufo de herbo. Vi bezonos ĝin antaŭ ol relevi vian pantaloneton."

Mia hezito mallonge daŭras. Kune, same en la movo, oni ĝuas ian integriĝo-senton.



KOMPENSO post SENIGO

Post la neceseja okazaĵo en la kampo, la trajno haltas en la stacidomo de la urbo *Saint-Dizier*.

Matenmanĝo atendas la rifuĝintojn.

La franca Ruĝa Kruco deĵoras sur la kajo, atendas nin. Helpantoj alvenas al la trajno proponante kafon, lakton, buteron, sukeron, panon, brioĉon, ... Nu, la matinmanĝa menuo estas plej kontentiga! La servo-preteco de ruĝkrucaj varmigas la etoson. "Ni do ne estas forlasataj. Ni povas kalkuli je helpo." Viroj lertigas siajn kruojn sur la kajo; infanoj ekposedas la lokon; ridadoj okazas, inter la ĉeestantoj lerta parolado liberiĝas. Flegistino kaj kuracisto grimpas en la vagonojn por prizorgi tiujn, kiuj restadas ene.

Sekvas tualetado en ĉiu ĉaro per akvo en basenoj. Ruĝkrucaj kontrolas kaj kompletigas la provizon en la vagonoj: sufiĉos la oleo-sardinoj, la fromaĝo "Brie" kaj la senkrusta pano. Kaj ni, kamparaj povruoj, bonvenigas tiajn specialaĵojn.

La trajno ekrulas. Tri aliaj tagoj, lacigaj, sinsekvas sub vagona taktakado. "Kie do ni finfine alvenos, endomiĝos?" La vilaĝestro svage scias: en la departemento *Charente*!


La konvojo finfine haltas en la urbo *Royan*, marborda feriejo. "Ĉe l'oceano!". Elĉerpitaj pasaĝeroj unue suspektas mistifikon. Sed la novaĵon fortigis iele nova aero, specifa. "Enspiru profunde! Ĉu vi ne flaras nekutiman bon-odoron? lom salitan, ĉu, ne? Joditan?"

"Ĉe l'oceano!" sonis kiel kompensado.

(Aliaj malhelpaĵoj gvatis en Royan! ...)

Dum ĉiu kongreso la esperantistoj kantas la himnon "La espero". Sed kiu ĝin komponis ?

Félicien Menu de Ménil naskiĝis en Julio 1860 en Boulogne-sur-Mer kaj mortis la 28-an de marto 1930 en Neuilly (apud Parizo), li estis konsulo kaj muzikisto.



Li esperantistiĝis en 1901, abunde skribis artikolojn en preskaŭ ĉiuj Esperanto-gazetoj, same kiel propagandajn tekstojn en franca lingvo kaj fariĝis komitatano de Societo Franca por la Propagando de Esperanto. Krome li estis direktoro de Franca Esperantisto kaj France Esperantistekaj ĉefredaktoro de La Revuo. Ekde 1919 Menu de Ménil membris en la Lingva Komitato. Li estas precipe konata kiel „la muzikisto de Esperanto“. Li verkis multajn melodiojn kaj kantojn kaj ĉiuj esperantistoj konas lian muzikon de la himno La Espero, kiu kvankam ne la unua, iom post iom oficialiĝis.



Krome li verkis:

- L'Héritage Klodarec, unuakta prop. komedio, 1906
- La mortigistoj de Stradella, rakonto, samjare en la septembra numero de La Revuo
- Les préjugés contre l'E, 1908
- Muzika Terminaro, 1908

Ankaŭ lia edzino Sophie (1870-1925) estis aktiva en Esperanto-movado.

***SPIRITA REVOLUCIO en la koro de Eŭropo* Přemisl Pitter 2017 KAVA-PECH 1917**

Tradukis el la ĉeĥa Margit Turková

La koro de Eŭropo indikas la landon, kiun ankaŭ kore amas la eldonisto de tiu traduko, Peter Chrdle. Li eldonis la tradukon de tiu verko de Přemisl Pitter, ĉeĥa humanisto, kiun ni komparas en nia regiono kun iu Albert Schweitzer. Temas pri kuraĝa homo, kiu ne nur predikis, sed mem sin engaĝis antaŭ, dum kaj post la Dua Mondmilito en Ĉeĥio, en malriĉaj kvartaloj de Prago, por helpi al la plej mizeraj el la mizeruloj, ĉeĥaj, germanaj aŭ judaj. Eĉ post la Dua Mondmilito, kiam la hato inter germanoj kaj ĉeĥoj kulminis, li ne distingis inter la nacieco de la bezonuloj. La maldemokratecon de la postaj komunistaj ĉeĥaj registaroj li kuraĝis kritiki, kio lin devigis al ekzilo en Svislando, kie li plu rezistis kaj rezistigis per la ondoj de Radio Free Europe.

En sia libro Přemisl Pitter prezentas al ni aron da citindaj homoj, kiujn gvidis dum la vivo spirita valoroj humanismaj en ties agado por pli justa mondo aŭ por lukti kontraŭ la potenca katolika eklezio - iuj tion faris eĉ antaŭ la famkonataj figuroj de la protestantismo – aŭ kontraŭ la ekspansiista politiko de la Aŭstra Imperio por fine atingi la sendependecon de Ĉeĥoslovakio post la Unua Mondmilito. Kaj poste necesis batali kontraŭ la nazioj kaj la komunistoj.

Sinsekve vi konatiĝos en ĉi-tiu interese ga libro kun la princo Václav, Jan Milič el Kroměříž, Jan Hus, Hieronimo la Praga, Petr Chelčický, la Frato Řehoř, Jan Amos Komenský, la instruisto de nacioj kaj Tomáš Masarík, la filozofo kaj ŝtatestro. Malkovru tiujn citindajn ĉeĥojn!





El nia libroservo

Informoj



⇒ la libroservo partoprenos la venontan komunan semajnfinojn en Lörrach la 18/20ajn de oktobro 2019 . . . kaj en Art-Sur Meurthe la 27/29ajn de marto 2020.

La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto-France Est: esperanto.france.est.free.fr. Se iu precipe allogas vin: avertu min per retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!


Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net




Nove alvenintaj libroj



①



②



③

- 1) **ESPRIMARO -Promenoj en Edeno!** *Esprimaro*, Petro Desmet, F. E. L. , 2019, 140 p. 12 €. Blekoj por 410 bestoj, Malsimileco de komparoj laŭ la lingvoj, Diversaj manieroj por esprimi "tre", Eblaj esprimoj pri nocioj el 460 radikoj.
- 2) **LA FOTOALBUMO FERMIGAS**, Rakonto, Trevor Steele, F. E. L. , 2019, 78p, 7 €. Tria kaj lasta (?) volumo de la fotoalbumo,
- 3) **KONSTRUADA KAJERO DE TAKE 2019**, Tekniko, Pierre Grollemund, TAKE. 2019, 76 p, 8€. 4a jara numero de tiu tre interesa kajeraro de Tutmonda Asocioj de Konstruistoj Esperantistaj. Ĉi-jare pri pavimoj, la nova sarkofago sur Ĉernobil, la kastelo Guedelon, la ornamaĵoj sur tegmentoj. . .

Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
 - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net" - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54.
2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
 - franca ĉeko je "Esperanto France Est" sendita al la supra adreso
 - poŝta ĝiro al "Esperanto France Est" CCP 0 1997 72W NANCY"
 - interbanka ĝiro al "Esperanto France Est"

IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC PSSTFRPPNCY.

<i>Mendilo</i>	Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino	
En	Subskribo:



41a BAVELO-Seminario - 86a regiona aŭtuna staĝo 18a - 20a de oktobro 2019 en Lössrach

Ne, la bildo **ne** estas el Lössrach, sed el Bazelo.

Ni gastiĝos en la junula-gastejo de Lössrach, kaj la sabata ekskurso gvidos nin al la apuda urbo Bazelo (vd la bildon, kvankam oktobre - ni ne baniĝos en Rejno, promesite !!!)

Krome estas multaj belaj kaj interesaj facetoj, kiuj valorigas vian partoprenon al la seminario.

En la bukeda kurso parolos Thomas Bormann pri sia tempo en Istanbul "Ŝanĝiĝo de malferma socio al aŭtoritate strita socio en Turkio". Kaj li tuŝas plian gravan temon: "kiel Stasi observis Esperantistojn en GDR (La danĝeraj lingvo-uzantoj en GDR)". Pliaj interesaj prelegantoj kaj temoj - inter alie pri vojaĝego per bicikla - atendoj vin, detaloj sekvas baldaŭ per nia novaĵ-letero bavelo-aktuel.

Vespere vi povas ĝui kaj miri kaj elprovi viajn sciojn en kvizo pri la vasta bunta mondo de lingvoj kaj poste rnalstreĉiĝi dum babilado en la knajpo.

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Du noktoj en la junulargastejo, ĉiuj manĝoj (* sabate tagmeze propra-koste ekster la junulargastejo)

en 4-lita ĉambro 70 €

en 2-lita ĉambro 90 € (tre limigita kvanto)

Programskemo

vendredo, 18a oktobro

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj

18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo

19:00 - 20:00 kurso

ekde 20:15 vespera programo poste knajpo

sabato, 19a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

09:00 - 11:45 kursoj de ĉiuj niveloj

12:00 - 13:00 ekiro al tagmanĝo, poste daŭrigode la ekskurso al Bazelo, urbogvidado

18:00 - 19:00 vespermanĝo

19:00 - 20:15 kurso

ekde 20:30 vespera programo poste knajpo

dimanĉo, 20a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

08:30 - 09:00 redono de ĉambroj

09:30 - 11:30 kursoj

12:00 - 13:30 tagmanĝo

DJH Jugendherberge Lössrach

Steinenweg 40, DE-79540 Lössrach

{Koordinatoj: 47.5004859 N, 7.6782375 E}

Tel: +49 (0) 7621 47040

jugendherberge-loerrach.de

Kursoj:

- A** komencantoj (Gerold Busch)
- P** paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B** Bukedo kun diversaj prelego-"floroj" de pluraj prelegantoj (detaloj en la supra teksto)
- i** Infan-prizorgado por infanoj (2-10-jaraj) (Cornelia. Majer, Barbara Bertrand)

Aliĝilon bonvolu sendi al:

inge.simon@esperanto.de

aŭ poŝte al S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20
DE-73431 AALEN

Pagebla per ĝiro al

CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy

per franca ĉeko al Esperanto France-Est

sendata al André GROSSMANN

5, rue des Pyrénées,

68390 BALDERSHEIM

ret-adreso: andreo.ag15@sfr.fr

Aliĝilo

(bv sendi al: Inge.simon@esperanto.de)

Tel. +49 7361/ 360 615)

Mi ĝiras _____ eŭrojn al jena konto

- BAVELO-Konto:** IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22 - BIC: SOLADES1VSS . (Sparkasse Schwarzwald-Baar)
- CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy**
- IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY

Mi partoprenas la kurson A / P / B / i .

Mi volas dormi en ...

- 2-lita ĉambro ve/sa sa/di
- 4-lita ĉambro ve/sa sa/di
- Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

Manĝoj en la junulargastejo:

- Mi volas vegetarajn manĝojn
- Mi havas alergion kontraŭ _____

Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso,

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago al unu el la du kontoj.

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2020

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

29an de Februaro- 7an de Marto 2020

Informoj kaj aliĝoj :

- **Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88
- **Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

ALIĜILO AL M.E.S. 2020

MEDITERANEA ESPERANTA SEMAJNO - SAINT-RAPHAËL - FRANCIO

NOMO de la 1a partoprenanto: Naskiĝdato.....

NOMO de la 2a partoprenanto: Naskiĝdato.....

NOMO de la 3a partoprenanto: Naskiĝdato.....

Adreso :

Tel. : Retadreso :



► Mi partoprenos de la 29a de Februaro ĝis la 7a de Marto 2020 : jes ne

Sendu al Christine Graissaguel (vidu adreson ĉi-supre)

ĜENERALAJ INFORMOJ

Alveno : De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per taksio.

Akcepto : sabaton la 29an de Februaro - 15:00 **Fermo :** sabaton la 7an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

Kurs-horaroj : 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

Partopreno en kursoj (4-nivelaj) : Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

Nomo/persona nomo	Kursniveleoj	Kursgvidantoj	Niveleoj
	1	Christine GRAISSAGUEL	Vera komencanto
	2	Elisabeth LE DRU	Komenc-parolanto
	3	Pavla DVORAKOVA	Progres-parolanto
	4	Mikaelo BRONŝTEJN	Diskuto/analizo

Liberaj posttagmezoj por : bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

Ne forgesu viajn marŝo-ŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.

Distraj vesperoj far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp. Eblas bankuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.

ALIĜKOTIZO (ne repagebla) kaj LOĜADO

Plenkreskulo : 60 € Paro : 100 €

(senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : x 360 € = €

Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x € = €

Suplemento por unulita ĉambro : x 110 € = €

Popersona suplemento por ĉambro almara : x 70 € = €

KURS-NIVELO

Mi partoprenos la kursaron : 1 2 3 4

Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

Trajne (St Raphaël) Fluge (Nico) Memveture

RESUMPAGO

Aliĝkotizo €

Restado €

Tuta sumo €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël", sendota kun aliĝilo al:

Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)

- aŭ **per bankoĝiro** al :

Société Marseillaise de Crédit

IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980 0020 041

BIC: SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB- 83700

ST RAPHAEL

87a staĝo Regiona Staĝo en Art-Sur-Meurthe



okazos la 27 / 29-ajn de marto 2020
en Centre de Loisirs d'Art-Sur-Meurthe
36 avenue de la Chartreuse,
54510 ART SUR MEURTHE je 10 km de
Nancy
organizata de la grupo de Nancy



Programoj kaj aliĝilo aperos en la venonta numero de La Informilo,
kaj intertempe en nia retejo: esperanto.france.est.free.fr.
Vi estos ankaŭ informita pere de niaj dissendolistoj.

LUMINESK

Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio

28.12.2019 - 03.01.2020
Nördlingen / Germanio

LUMINESK' estas la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto Asocio. Ĝi nun okazos la

kvinan fojon kaj fariĝis posteulo de la iamaj "Internaciaj Festivaloj" private organizitaj. Ankaŭ ĉi-foje ĝi ofertas varian kaj altkvalitan programon - lingvokurson, prelegojn kaj diskutgrupojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Partoprenantoj kutime venas el 7-8 landoj.



La kvina Luminesk' okazos en Nördlingen ĉe montaro Ries (inter Stuttgart kaj München/Munkeno). En la historia urbo ĉe la limo inter Baden-Virtembergo kaj Bavario jam okazis

Internacia Festivalo (IF) plurfoje. Vin atendas varia tema programo kaj ekskursoj al la regiono. Krome ni klopodas pri interesa vespera programo, kiu estos kronata de la silvestra nokto.

Kontakto: Andreas Diemel Retpoŝto: demandoj@luminesk.de, internacie +49 203 29 64 877 (fiksreta)

La kotizo inkluzivas la restadon de la 28a de decembro 2019 vespere ĝis la 3a de januaro 2020 matene (loĝado en dulita ĉambro, tri manĝoj tage, programo kaj silvestra bufedo). Unulitaj ĉambroj estas haveblaj por krompago de **15 €/nokto**. Ekskursoj estas pagendaj aparte.

Atentu: Ĉi-jare Luminesk' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

Aliĝo ekvalidas per **antaŭpago de 50 €** al jena konto de Germana Esperanto-Asocio:

IBAN: **DE53 5058 1952 0040 1158 42** (Sparkasse Odenwaldkreis) BIC: **HELADEF1ERB**

Pagelo: Luminesk' 2019 Nördlingen + via nomo; aŭ per UEA-Konto **geaa-n**.

Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/pri-luminesk>

Okaze de bezono, nia kasisto pretas peradi viajn antaŭpagojn

Kosto de Volontula instruado de Esperanto en Benino??

En novembro 2018 komenciĝis la projekto "Volontula-Instruado de Esperanto" en la Esperanto-centro Afrika Centro Mondcivitana/ACM Benino, kunlabore kun s-ro Fernando Maia. La centro varbis togolandan esperanto-instruiston nome Ezekiel KEDE GADJI, kiu volontumis dum unu jaro. Li plentempe instruadis al infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj en la centro kaj en kelkaj gimnazioj en la urbo.

Li faris admirindan kaj fruktodonan laboron en esperantujo: instruadon, organizadon de zamenhof-tago, de esperanto-tago kaj la radio-elsendon.

La mandato finiĝis. ACM Benino celas longdaŭrigi la projekton kaj lanĉis denove alvokon por varbi la duan volontulon laŭ la sama modelo. La deĵoro-periodo estos ekde septembro 2019 ĝis junio 2020. Por venigi tian volontulon, ACM Benino bezonas:

1- por loĝkosto: 23 € x 10 = 230 €

2- por vivsubvencio: 80 € x 10 = 800 €

Do 1030 € estos bezonataj por la tuta periodo.

Por subteni la volontulan instruadon de Esperanto dum 10 monatoj bonvolu sendi vian kontribuon al la **UEA-konto fjpm-k** kun mencio "**volontula- instruado de Eo**".

Ni anticipas dankas ĉiujn kontribuantojn, kiuj tiam regule ricevos periodajn raportojn.

Raportas, François Hounsounou.

François (Franko) HOUNSOUNOU,
BP 226 Lokossa-Mono
Rép. du Bénin
West Africa
Skype: [esperantoawc](https://www.skype.com/user/esperantoawc)
www.acmbenin.org

La 92-a SAT-KONGRESO en Barcelono 4. 8.-11. 8. 2019

Ĝi okazis en bieno de Salesianaj fratoj en la populara kvartalo *Horta* de Barcelono. Bela ĝardeno kun pluraj romantikaj anguloj, floroj, basenetoj kun testudoj kaj fiŝoj, fontanoj, statuoj kaj palmoj ĉirkaŭas la lokon. Ĝi estas tre aglabla ripozejo, sed tamen dum la kongreso oni multe laboris kaj ŝvitis pro la varmega tutsemajna vetero.

Antaŭ cent dek jaroj okazis en Barcelono la tre sukcesa 5-a Universala Kongreso, kiun ĉeestis doktoro Esperanto, L. L. Zamenhof. Barcelono allogas. Al la ĉi-jara kongreso aliĝis 220 gesamideanoj el la tuta mondo. Post la alveno oni bonvenigis la unuafojajn kongresanojn kaj klarigis al ili kio estas SAT. En la bela okulfrapa kongres-sako ni malkovris ilustritan kongres-libron redaktitan de Javier Alcalde kun detalaj priskriboj de ĉiuj programeroj. Krom tio enestis dulingva libreto “Esperanto: Unu lingvo por ĉiuj” de Eduardo Vivancos kaj la broŝureto pri “Don Kiĥoto kaj Sanĉo Panco” de Marcel Redulez kaj Klodin'Pomirol.

Dimanĉon, dum la interkona vespero, la ĉeestantoj povis lerni plurajn tutmondajn dancojn. Lunde matene Saioa Escobar kaj Vinko Markov bonvenigis la partoprenantojn de la 92-a SAT-kongreso. La reprezentantoj de diversaj asocioj salutis la kongreson. Juliette Ternant transdonis parkerigitan mesaĝon de sia frato Eduardo Vivancos loĝanta en Kanado. Li ne povis ĉeesti la kongreson persone pro alta aĝo. Tamen, alian tagon, surprize okazis rekta telefona kontakto kun li. Mi invitis la ĉeestantojn al la 72-a kongreso de fervojistoj, okazonta venontjare en Germanio en la urbo Frankfurt ĉe Odoro kaj en la pola urbo Słubice. Poste ni komune fotiĝis.

Dum la kongresa semajno okazis E-kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, portret-ateliero, spektado de filmoj kaj de nepalaj dancoj, kaj interesatoj povis tablulodi. Bone estis prizorgataj la libroservo kaj la diskoservo. La gajnintoj de fotokonkurso ricevis libron. Aŭkcion prizorgis laŭtradicie Tahira Masako kun helpo de la korea kamarado Songo. Por la asocio estis kolektita sumo de 701,50 €. Przemysław Wierzbowski el Pollando invitis la gekongresanojn per alloga prezento al la venontjara SAT-kongreso, kiu okazos en Bjalistoko, la naskiĝurbo de nia Majstro L. L. Zamenhof. Franjo Martin iniciatis kant-atelieron kun gitar-akompano de Xavier Rodon. La partoprenantoj ĉe la fino prezentis aron da revoluciaj kantoj. Miguel Fernández prezentis sian tradukon “Ha, Karmela” kaj sian poemaron “Rev-ene”. Franciska Toubale emociplene deklamis la poemon “Ankaŭ mi estas homo”. Okazis peĉakuĉaj sesioj-bildoprezentoj pri diversaj temoj kun komentoj. Ekz: pri rifuĝintoj en Samoso kaj en Francio, historio pri la kongresejo, pri naturkuracado, pri mondmappoj, bitarkivo, pri Klara Zamenhof ktp.

Kunvenis liberecana, sennaciisma kaj komunisma frakcioj, okazis laborkunsidoj kaj diversaj prelegoj: “Altsasu kaj la kataluna procezo”, “Ĉu Esperanto plibonigas/plibonigos la mondon?”, “Niaj sentoj pri eblo de disfaligo de nia vivmaniero”, “Kiel kopirajto malhelpas kulturkreadon”, “La retiriĝo-koncentrejoj-Liberigo-Ekzilo”, “Ĉu la ĉifrovalutoj povus helpi la sennaciulan ekonomion?”, “Sovaĝaj floroj. Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke”. “Minoritatoj en infanlibroj”, “Pri la japana laborista sindikato Kannama”, pri “Hispana revolucio kontraŭ Sovetio”. Okazis jarkunveno de la vegetara sekcio kaj de la ekologiisma frakcio de SAT, de la eldona fako kooperativa kaj de la poresperanta fako, de la liberpensula frakcio. Okazis ankaŭ la jara kunveno de la LEA-komitato kaj la asembleo de SATEH.

Grandan intereson vekis la programero pri “Norda Koreio: demandoj kaj respondoj” gvidata de la kataluno Alejandro Cao de Benós, kiu havas rektan rilaton kun la registaro de tiu lando. Aldoniĝis alia debato kun samideanoj el suda Koreio, kamaradoj Paz kaj Songo. Ankaŭ vaste estis preparolata la nuntempa politika situacio en Katalunio. Dum socia forumo pri anarkiismo, socialismo, komunismo oni prezentis diversajn politikajn vidpunktojn. Ĉe la lasta laborkunsido estis akceptitaj gvidrezolucio kaj deklaro.

Duontaga ekskurso al Can Masdeu montris al la partoprenantoj alternativan vivmanieron de malgranda komunumo de 30 personoj en memmastrumata socia centro. La ĉeestantoj povis elekti inter du tuttagaj ekskursoj. La unua malkovris al ili la ĉirkaŭaĵon de *Subirats*, kie troviĝas muzeo de Esperanto fondita en la jaro 1968-a fare de Luis Hernández Yzal. En la dua ekskurso, kies celo estis *Montserrat*, oni vizitis ankaŭ la bibliotekon Ramon Molera. En ambaŭ ekskursoj ili bone tagmanĝis kaj trinkis bongustajn regionajn vinojn.

Ĉiuvespere okazis artaj kaj kulturaj spektakloj. Eksterordinara estis la koncerto “Mia liriko kaj muziko” de Miguel Fernández. Entuziasmon atingis koncerto de JoMo, kiu post kelkaj revoluciaj kanzonoj dancigis la publikon tiel fervore, ke ĉe la lasta kanto rompiĝis al lia gitaro du kordoj. Saša Pilipoviĉ krom la teatraĵo “Vivo de Galileo” prezentis Universalan Kabaredon kaj kantis ciganajn kantojn. Eŭskajn kantojn kun gitar-akompano prezentis juna knabo Porrumentzio. La lastan vesperon koncertis por ni la fama kataluna grupo Kaj Tiel Plu en unu ĝardena angulo. La intereson de la publiko vekis pupateatraĵo “La sorĉistino kaj s-ro Kristoforo” prezentata de profesia kompanio *Titeres Desde Abajo* (Desubaj pupoj). Pro tiu teatraĵo ili estis antaŭ tri jaroj enkarcerigitaj. Ĉe la fino de la kongreso estis transdonita la Esperanto-flago al la pola reprezentanto. Korajn dankojn al la organizintoj pro la sukcesa kongreso. Pli detale pri la ĉi-jara SAT-kongreso vi povos legi aliloke kaj eblos spekti filmojn pri diversaj kongreseroj en la jutuba kanalo de SATEH: <http://www.youtube.com/user/sateh>

La 92-a SAT-KONGRESO en Barcelono 4. 8.-11. 8. 2019



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

La 86-a Itala Kongreso de Esperanto en Triesto 24. 8.-31. 8. 2019

Ĉi-jare la itala urbo Triesto gastigis la italan kongreson en luksa hotelo Savoia Excelsior Palace. Ĉe la enirejo ambaŭflanke bonvenigis nin speciala standardo kun portreto de L. Zamenhof realigita de Mirko Nikodimovich. Al la aranĝo aliĝis 258 geesperantistoj el 28 landoj de kvar kontinentoj. Ĵaŭde, antaŭ la kongreso, okazis gazetara konferenco kaj vendrede estis inaŭgurita en Poŝta kaj Telegrafa Muzeo Mezeŭropa ekspozicio "Trieste kaj Esperanto", kiun zorgeme pretigis Elda Doerfler. Pri la kongreso interesiĝis la ŝtata televido kaj plurfoje filmis nin dum la evento. Ankaŭ en lokaj gazetoj aperis artikoloj.

Dum la interkona vespero estis prezentita la programo de la kongresa semajno kaj allogaj bildoj pri la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Poste kelkaj ĉeestantoj prezentis sin. Dimanĉe, dum la solena inaŭguro, salutis personoj el diversaj asocioj. Estis legata mesaĝo de la nova UEA-prezidanto Duncan Charters. La litova komisionano de EU Vytenis Povilas Andriukaitis intervenis surekrane parolante pri Esperanto kaj lingva justeco en Eŭropo. Ĉe la fino li deziris sukceson al la kongreso.

La kongresa temo estis: Mult-kulturismo kaj plur-lingvismo hodiaŭ. En la programo estis inkluzivita seminario "Leonardo" pro la 500-jara morto-datreveno de Leonardo da Vinci, la fama itala pentristo malpli konata kiel inventisto, arkitekto, muzikisto kaj sciencisto. Honore al li estis dediĉitaj pluraj programoj. Al la "EEU-seminario" kontribuis per interesaj prelegoj la jenaj prelegantoj: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljarić, Jozefo Reinwart, Michele Gazzola.

Ne malpli interesaj estis aliaj prelegoj pri "Esperanto-muzeo en Vieno", kiun prezentis ĝia direktoro Bernhard Tuidar. Pri "La plej gravaj historiaj eventoj kaj iliaj lingvoj" kaj pri "Hungario kaj problemoj pri internacia komunikado" parolis Gábor Márkus. Pri "Etna kaj lingva diverseco en Ameriko: defioj por edukado" informis Maritza Gutiérrez Gonzáles el Kubo. En alia okazo ŝi parolis pri "Havano 500-jara aŭ la defioj de mult-kultura urbo". Interesan manieron prezenti "Kulturajn diferencojn en Eŭropo kaj Azio" montris per bildoj Nan Matthias Wang, ĉindevena germanino. Pri "Dagestano-lando de montoj, montoj da lingvoj" parolis Abdurahman Junusov el tiu lando. Ĉe la fino de la prezento du ĉarmulinoj, folklore vestitaj, prezentis dagestanan dancon. "Renkontiĝo kun la revuo Esperanto" prezentis ties redaktoroj Anna Striganova kaj Dmitrij Ŝevĉenko. "Plurlingvismo kaj la rolo de poliglotoj en ĝi", "Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj"? kaj "Novaĵoj de la E@I-kuirejo" prezentis la

slovako Peter Baláž. "La nova retejo uea.facila.org" prezentis Anna Löwenstein kaj pri "Unesko-kuriero en Esperanto" parolis Michela Lipari.

En la salono, kie funkciis la libroservo okazis prezentado de diversaj libroj. Por filatelistoj estis eldonitaj prikongresaj bildkartoj kaj porokaza filatela kongresstampo. Okazis du Esperanto-kursoj gvidataj de Anna Löwenstein (komencantoj) kaj Dalia Pileckiene (progresantoj). Eblis sperti kaj ekzerci Ĉi-gongon subĉiele. Ankaŭ junuloj havis sian programon kaj multe amuziĝis ne nur dancante. Ĉeestantojn interesis "Lego-robotiko"-konstruado de robotaj modeloj instruata de Peter Grbec.

Dum ĉi-kongreso abundis duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj. Tutsemajne dum la duontagaj ekskursoj eblis ekkoni la urbon kaj viziti la padon Rilke, kastelon Duino, fontojn de rivero Timavo, grotajn San Canziano, parkon kaj kastelon Miramare, historiajn kafejojn, diversajn preĝejojn. La tuttagaj ekskursoj vizitigis iom pli forajn lokojn kaj ties interesaĵojn: katedralojn, palacojn, preĝejojn, bazilikojn, muzeojn, mozaikojn, kastelon, sinagogon, kaj aliajn mirindaĵojn kaj historiajn objektojn. Marde okazis vizito al la urboj Gemona kaj Venzona. Merkrede oni povis elekti inter du ekskursoj. Unu el ili vizitigis al la partoprenantoj la urbon Gorizia situantan ĉe la slovena limo kaj la alia direktiĝis al romiaj temploj en la urbo Aquileia. Ĵaŭde la ekskursantoj ekkonis la Longobardan epokon en la urbo Cividale del Friuli. Sabate oni sekvis spurojn de sanktejoj en urbo Grado kaj en la insulo Barbana.

Vespere ni ĝuis programojn de italaj artistoj. La duopo Evocaré (muzikkomponisto kaj deklamanto) prezentis: "Mi revenas por rakonti-Vivo kaj morto de Maska". Lunde kantis por ni la jam konata itala kantistino Grazia Barboni. Ĉe la triesta kastelo Sankta Justo ni spektis plej parte en la itala lingvo monologan prezenton de Mario Migliucci pri "Doktoro Esperanto". Ĝi estis dediĉita precipe al la itala publiko. Sekvis romantika vespero kun instrumenta muzikgrupo Lumen Harmonicum en la kongresejo. Vendredan adiaŭan vesperon la muzikgrupo ArĉKvarteto prezentis "Muziko por revii" dediĉitan al vienaj kaj mezeŭropaj muzikaĵoj.

Post la prezento de la venontjara itala kongreso, okazonta en la urbo Assisi (Asizo) de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto, oni resumis la kongresajn laborojn. Intervenis ankaŭ skabenino pri junulara politiko bondezirante la organizantojn pro la efika Esperanto-aktivado en Triesto. La prezidantino de la Itala Esperanto-Federacio Michela Lipari dankis al la ĉefaj organizantoj de la kongreso (Edvige Ackerman kaj Elda Doerfler) kaj al iliaj kunhelpantoj pro la sukcesa kongreso. Ĉiuj ricevis donace libron. Ankaŭ Michela ricevis libron de la triestanoj. Ni ĝuis tre abundan kaj enhaviĉan programon.

Michel Basso, prezidanto de TAKE sukcesis donaci al la kongresanoj paketojn da polento kun surskriboj en Esperanto.



Liba Gabalda

Ni lernu per enigmoj kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1									■	
2				■						
3								■		
4							■			
5								■	■	
6						■				
7				■						
8										
9			■		■		■		■	
10										

A.G.

Paro vizitas pentraĵo-ekspozicion..

Subite la edzo atente rigardas pentraĵon, kiu prezentas lian edzinon, tute nuda!

“Sed.... sed... ja temas pri vi!

Ĉu vi povus klarigi al mi, kiam vi pozis por tiu aĉulo?

- Trankviliĝu, mia kara.. Mi neniam pozis! Supozeble li pentris laŭmemore!”

Iu maljuna viro sonoras ĉe pordo de kazerno..

“Mi deziras saluti mian nepon, kiu nuntempe militservas ĉi-tie...

- Vi alvenas tro malfrue, li ĵus petis permerson por via entombigo.

“Mia edzino tute stultas”, rakontas viro al sia amiko....

“En lasta semajno mi sciigis al ŝi, ke unu el miaj praavoj mortis en Austerlitz” (ankaŭ parizo metro-stacio). “Nekredeble, ŝi eĉ demandis: “

“Sur kiu kajo?..”

“Efektive ŝi estas stulta! Sed kion fakte faris via praavo sur tiu kajo? “

Du uloj, malbon-intencaj profitas la dimanĉan paŭzon por ŝteli brikojn sur konstruejo.

Ili alveturas per aŭto, malfermas la kofron por rapide ĝin plenigi..

Subite polic-veturilo alproksimiĝas..

“Atentu, ne paniku! Faru daŭre la samajn gestojn sed inverse, kvazaŭ por malplenigi la kofron!”

Policisto scivolemo demandas:

“Kion vi faras ĉi-tie?”

- Restis al ni kelkaj brikoj, tial ni venis por ĵeti ilin en taŭgan lokon..

- Sed vi ja stultas, ĉi-tie ne estas rubaĵejo!”

- Nu, vi reprenu ĉiujn viajn brikojn kaj forveturu!.. “

HORIZONTALALE:

1. Muzikaro.
2. Por trajn!. Japan-devena poemo.
3. Malruzula. Prefikso.
4. Esti en ekstrema pozicio de orbito. Kapablo.
5. Subkomprenita kompar'.
6. Virina nomo. Divid'
7. Pezo de pakum!. Anĝele.
8. Imitado de natura bruo.
9. Mallongigo de Junulara Teamo
10. Organo de fiŝo.

VERTIKALE:

1. Plibeligotojn.
2. Refoje videbla.
3. Laksiga aŭ nutra fluaĵo
4. Ne mian sed.
5. Lern-speciala
6. Korpoparto. Klane.
7. Ribonuklea acido. Raŭka bleko.
8. Cifero. Kune funkciigi.
9. Gas!. Ced'.
10. Periodo-lumo heliganta per gaso

Fremda paro iom perdiĝis en grand-magazeno...

Finfine ili trovas gvido-mapon ĉe la muro. Ĉe ruĝa cirkleto estas skribita: Vi estas ĉi-tie.

“Tio estas ege stranga” diras la edzo al sia kunulino:

“Neniu sekvis nin, malgraŭ tio ili scias, kie ni troviĝas”

Du amikinoj vizitas muzeon, ĉe tute blanka pentraĵo, ili longe rigardas kaj ne komprenas pri kio temas.

“Kio estas la temo de tiu pentraĵo?”

- Nu, legu bone: Bovinoj paŝtiĝas sur herbejo

- Sed mi tute ne vidas herbon?

- Tre verŝajne la bestoj jam ĉion formanĝis..

- Sed ankaŭ tute same eĉ la bovinojn mi ne vidas!

- Tamen iom pripensu! Kial restu la bovinoj, se ne plu estas herbo!”

En lernejo:

Gepatroj dezirus por siaj infanoj tiajn taskojn, kiujn ili mem kapablus solvi.

SOLVO KVE 186:

HORIZONTALALE: 1.LAINFORMIL'. 2.ULG. RR. ARE. 3. KELFENESTR. 4.SN. EGIPT. 5.STATO. DE. 6.MOI. TOKSO. 7.BIEL. LOT. 8.URSINO. ETA. 9.RET. EGALC. 10.GLOR. IROKO.

VERTIKALE: 1.LUKSEMBURG. 2.ALEN. OIREL. 3. IGL. SIESTO. 4.FET. LI. 5.FREGAT. NE. 6. ORNITOLOGI. 7.EPOKO. AR. 8.MAST. STELO. 9.IRT. DO. TEK. 10.LERTE. KACO.

Okaze de la BET-55 en Litovio, pluraj koreoj partoprenis tiun aranĝon kaj aktive prezentis koncertojn. Jen Kim Songa (Belapino) raportas pri ĝi kun emociaj personaj sentoj.

Baltiaj Esperanto-tagoj okazas laŭvice en Latvio, Estonio kaj Litovio. En 1959 komence la aranĝoj nomiĝis *Ĉebaltiaj Esperantistoj Tendaroj*, poste *Baltiaj Esperanto-Tendaroj* kaj fine *Baltiaj Esperanto-tagoj*. Kaj nun Baltiaj Esperanto-tagoj fariĝis tuteŭropa aranĝo kun multjara tradicio.

Ĉi jare de la 6-a ĝis la 14-a de julio 2019 BET-55 okazis en urbo Panevėžys, en Litovio.



El 37 landoj pli ol 425 anoj partoprenis. Kaj 39 koreaj Esperantistoj estis en tria vico laŭ nombroj de partoprenantoj.

En trankvila kaj bela urbo Panevėžys ĉiutage okazis diversaj prelegoj, lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj, belaj koncertoj kaj ekskursoj. En solena inaŭguro bonvenigis nin artaj grupoj, kiuj kantis lirikajn kantojn, faris danc-prezentojn. Kaj post la inaŭguro ni havis varman urbestran akcepton kun belega deserto, vino kaj bona amuzo,

El diversaj prelegoj mi partoprenis prelegon de Lee Jungkee "Kien Azia Esperanto-movado iras". Li prelegis pri spertoj, direkto kaj estonteco de Azia movado kun multaj ĉeestantoj. Fine li prezentis



Blankon (Sim Myounggi). Blanko prezentis kiam kaj kial li eklernis Esperanton kaj poste fariĝis Esperantisto, kiel ŝanĝiĝis lia vivo. Kaj li belege kantis. Plej multaj ĉeestantoj surpriziĝis pri lia jaraĝo, lerta parolado kaj kortuŝiĝis pri lia vivado, kantado kaj poste entuziasme aplaŭdis.

Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj estis 4 kursoj por veraj komencantoj, komencintoj, progresantoj, tiuj, kiuj jam sufiĉe flue parolas la lingvon. Inter ili mi partoprenis kurson por progresantoj. Mia gvidantino estis franca sperta instruistino, kiu instruis ludante violonon, klarigante gramatikajn erarojn, farante diversajn ludojn por konversacio. Ĉeestantoj gaje kaj aktive lernis Esperanton.

Belegaj koncertoj ĉiuvespere okazis ĝis malfrua nokto. Somere en norda eŭropo okazas blankaj noktoj. Ĉirkaŭ la 22-a kaj duono malheliĝas. Pro tio oni ĝuis nesciante la malfrumon. El diversaj koncertoj dufoje koreaj koncertoj okazis. Unue talenta kantistino Amira (Chun Gyoungok) kantis belegajn orientajn etosojn, kiuj kortuŝis nin. Speciale kiam ŝi kantis Arirang, kelkaj ĉeestantoj kunkantante zumis, kaj okuloj de koreoj ruĝiĝis. Due, la belega koncerto 'Pacon kune' de la koreaj artistoj Jogailė Ĉojutė, Sung Minwoo kaj Kim Yulhee aranĝiĝis, ĝi plenigis salonon. La belaj junuloj prezentis precipe koreajn kantojn, tradikitajn al Esperanto kaj litovajn kantojn kun akompano de koreaj tradiciaj instrumentoj. Ĉarma korea koruso kaj amindaj koreaj dancistinoj instigis la du koreajn koncertojn pli amuze. Kaj speciale la koncerto de Kaŝi, kiu estas blinda muzikisto, komponisto, kaj kantisto el Hamburgo ĝojigis nin. Li eĉ dancigis la publikon! En la BET-55 multnombraj koreaj partoprenantoj kolorigis kaj riĉigis programerojn. Mi elkore sentis fieron kaj ĝojplenon.

Dank'al organizantoj de BET ni ĝuis enhavoriĉajn programojn, plenajn tradiciajn kulturerojn, agrablajn spertojn, riĉajn manĝaĵojn kaj havis longedaŭrajn impresojn de restado en BET. Kaj mi esperas certe reviziti la belajn Baltiajn landojn.

Belapino



Ankaŭ Manfred estas tre vojaĝema kaj saltas de Esperanto-aranĝo al alia, laŭ sia maniero. Jen lia rakonto.

La regiona koincido de la Baltiaj Esperanto-Tagoj kaj de la 104-a UK en Lahti donis al esperantistoj de aliaj kontinentoj la bonŝancon partopreni je ambaŭ kongresoj. Tiuj kiuj loĝas en orienta Eŭropo kaj ne povis partopreni je la UK, havis la okazon renkontiĝi kun azianoj kaj amerikanoj. Ankaŭ mi ĝojis renkontiĝi kun Mirka el Bieruń, la ĝemeliĝa urbo kun Gundelfingen (apud Freiburg im Breisgau), kaj trovis 'Matena' novan membron de niaj „ĝemeloj“ de Freiburg (ni prononcas kutime [Friburgo]), el la sud-korea urbo Sŭon. Ambaŭ partoprenis nur je BET.

Mi alvojaĝis trajne ĝis **Varsovio**. Tie havis paŭzon de kelkaj horoj, kiujn mi uzis por vagadi en la regiono ĉirkaŭ la centra stacidomo. Intertempe tie stariĝis kelkaj nov-tipaj altaj konstruaĵoj de interesa arkitekturo. Sed la plej alta restas tiu „Donaco de Stalin“ - giganta „Palaco de Kulturo kaj Scienco“, 250 m alta. En la proksima parko mi ripozis kaj trovis novan monumenton por honori Janusz Korczak [Januŝ korĉak], la kuraciston, aŭtoron kaj estron de juda orfejo. Proksime de la stalina nubskrapulo mi trovis en la pavimo larĝan tekst-bendon kiu montras „limo de juda geto inter 1940 kaj 1943“ *1.

Per nokta buso al Kaunas, Litovio, kaj per sekva buso al **Panevežys**. Survoje mi estis ŝokita de gigantaj gren-kampoj, plejparte sen trudherboj, nur kelkfoje en malgrandaj kampoj troviĝis la ruĝaj gren-papavetoj kaj ceanoj *2. Liba ja sufiĉe detale raportis pri la 55a-BET, kaj la libro pri BET montris sur 155 paĝoj multajn detalojn pri la litova Esperanto-komunumo kaj pri la 60-jara historio de la Baltiaj Esperanto-Tagoj – partoprenis la kun-fondintino de la unua BET, 1959, Birute Rozenfelde.

Restas aldoni ke la urbo montras en pluraj lokoj la historion de Litovio kaj dank' al laĝeto paralele al la Nevežys-rivereto kaj parkoj estis sufiĉe agrabla loko. Ekstere sen rubaĵoj.

Tro malfrue mi eksciis pri karavano post BET ĝis la UK, pro tio mi decidis viziti la urbojn **Riga** kaj Tallinn survoje, vojaĝante per buso. La Hanse-urbo Riga montras multajn belajn konstruaĵojn de la secesia stilo (germane: Jugendstil). Mi vizitis grandan etnografian subĉielan muzeon (skanzeno) kiu montras la diversajn – ĉefe lignajn – konstruaĵojn de la diversaj latvaj gentoj, kaj la metioj: fiŝistoj, prilaboro de sukceso, k.t.p.. Jurmala estas la ban-loko je la bordo de la golfo de Riga. En la t.n. moskva antaŭurbo troviĝas la Getto-Muzeo, parte en tipa domo kie troviĝas la maketoj de multaj iamaj sinagogoj. Ekstere trajn-vagono kaj multaj tabuloj kiuj montras la nazian propagandon kontraŭ la judoj, kaj ilian teruran sorton.

La buso al **Tallinn** tuŝas la Baltan maron apud Pärnu, kie indus ripozi. Sed mi nur vizitis Talinon, ankaŭ Hanse-urbo, pli dense la domoj ene de la urbo-muroj, kompare kun Riga. Pli da turistoj, ĉar tie ankras turismaj ŝipegoj. Tönu afable veturigis nin (s-ino Gao kun filino kaj nepino, kaj mi) al la alia flanko de la golfo. Trans la golfo eblas vidi la karakterizan silueton de la urbo. Al la malnova ortodoksa preĝejo nun oni konstruis duan, grandan, kiun ni vizitis

survoje. El historia vidpunkto tre interesa estas la muzeo Vabanu, pri Okupacio kaj Libereco. Ĉefe temas pri okupacio flanke de Sovetunio, kiam multaj baltoj estis translokigitaj al Siberio; kaj estis anstataŭigitaj pere de rusoj. Multaj baltoj povis reveni post la morto de Stalino. Dank' al la popola kantado – tre ŝatata kulturo en ĉiuj baltaj landoj – ili revigligis la senton pri propra nacieco. Gravus ke popolo



volas liberecon kaj agadas tiel. Ekde 1990 komenciĝis la disiĝo de Sovetunio, malgraŭ la penoj de 'Moskvo' reteni tiujn teritoriojn. En Vabanu eblas studi variantojn de demokratio, per donitaj demandoj kaj propraj respondoj.

De Tallinn per granda pramsipo al Helsinki, kaj trajne post unu horo ni atingis Lahtion – kie kelkaj samideanoj atendis la alvenantojn.

*1) la limoj de la Varŝavia Getto estis reduktitaj iom post iom, pro tio mi ne certas pri la ĝusta dato de tiu limo. Ek de la 19-a de Aprilo ĝis la 16a de Majo 1943 juda batal-grupo ZOB batalis kontraŭ la naziaj SS-gardistoj. Ilia agado instigis judojn en aliaj gettoj same ribeli kontraŭ la terura nazia SS. Finfine ili ne sukcesis, la gettoj estis plene detruitaj.

En Pollando la 1-a de Aŭgusto estas la Nacia Rememortago pri la ribelo de la poloj kontraŭ la nazia reĝimo. Ili ankaŭ ne sukcesis, sed kapitulaciis nur je la 1-a de Oktobro. Pollando neniam forgesas, ke Sovetunio preskaŭ ne subtenis la ribelon, sed proksime atendis la plenan detruon de Varsovio flanke de la nazia reĝimo.

Indas noti novan libron „Zamenhof en Varsovio“, de Roman Dobrzynski – en kiu temas pri la vivo de la unuopaj membroj de la familia reto.

*2) en Francio nun okazas peticio kontraŭ uzado de herbicidoj/pesticidoj por konservi tiajn tipajn trudherbojn kiuj apartenas al la kamparana kulturo, ĉar ili utilas la biodiversecon. Jen ligo al franclingva peticio al kiu atentigis Elizabeth Barbay: www.nousvoulonsdescoquelicots.org; en aliaj landoj vi trovos similajn peticiojn se vi serĉas pri „pesticid...“.



La 104a UNIVERSALA KONGRESO en LAHTIO de la 20a ĝis la 27a de julio 2019

La ĉi-jara Universala Kongreso okazis en norda urbo Lahtio en Finnlando. Malgraŭ tio, la vetero estis agrabla kaj varma kun mallongaj noktoj. Sed la kongresejo havis apartajn trajtojn, ĝi ne estis luksa palaco aŭ hotelo sed glaci-hokeo-sportejo. Aliflanke la ĉefa podio estis tre bone videbla de ĉiuj ĉeestantoj sidantaj sur sid-ŝtuparo. Iuj salonoj taŭgis, iuj estis ege malgrandaj. Jen raportas pri ĝi Liba.

Ĝi okazis en Finnlando en Lahtio, ne tro granda urbo, ĉirkaŭata de bela naturo, kiu famas pri vintraj sportoj. Ne pretervideblaj estas la tri ski-saltejoj



apud la sport-halo *ISKU AREENA*, kie la teamo *Pelicans* (Pelikanoj) trejnas sin kaj ludas glaci-hokeon. Tie okazis ankaŭ la ĉi-jara 104-a Esperanto-Kongreso. Verdire elekto de sporta stadiono por la UK ne konvenas. Salonoj (aŭ pli bone kameroj) estas tre malgrandaj, pluraj ŝtuparoj sen

lifto kaj altaj ŝtupoj en la stadiono ne estas adekvataj por pli aĝaj personoj, kiuj tamen en la UK-oj estas plimulto. Bonŝance ne okazis akcidentoj. Avantaĝo estis, ke ni bone vidis la podianojn kaj ni povis enrigardi malantaŭ la kulisoj de la sportejo. Konvena salono estis en apuda lernejo *Salpus*, kie troviĝis ankaŭ la dua manĝejo. La manĝoj estis bongustaj.

Finnlando estas lando de “Mil kaj unu lagoj..., betuloj..., saŭnoj...”. En vastaj arbaroj promenas boacoj kaj abundas fungoj; en lagoj naĝas fiŝoj.

Al la kongreso aliĝis 917 geesperantistoj el 57 landoj. La programo, kiel kutime estis ampleksa kaj varia. Krom kutimaj kongres-programeroj (Movada foiro,



Poŝtaj tarifoj en internacia kongreso.

En la akceptejo de la kongresejo eblis akiri poŝtmarkojn por sendi bildkartojn kaj leterojn.

Tamen en la unuaj tagoj oni proponis poŝtmarkojn nur je 1,50 eŭro, laŭ la enlanda tarifo. Feliĉe tiu tarifo ankaŭ taŭgis por malrapida sendo al la mondo, iuj asertis eĉ per ŝipo. Tre verŝajne plej multaj kongresanoj deziris sendi al eksterlando. En la postaj tagoj tamen eblis akiri la poŝtmarkojn je 1,60 eŭro, por eksterlanda sendo. Ja necesis kompreni, ke tia servo en internacia kongreso estas ĉefe por divers-landanoj.





Kleriga lundo, Tago de lernado, E-kursoj, KER ekzamenoj, IKU-AIS sesioj, Belartaj konkursoj, Urba akcepto, Esperantologia konferenco, Aŭkcio ktp.) la ĉeestantoj povis akiri praktikojn en aikido, eŭritmio kaj tajĝiĉuano, sciojn pri biero kaj sano, ekzercojn pri kapdolora masaĝo, informojn pri diversaj religioj: Oomoto, Budhismo, Spiritismo, Ŭombulismo, Katolikismo. Ne Di-kredantoj interesiĝis pri Ateismo.

Finnlanda gazetaro abunde informis pri la UK antaŭ la kongreso, kaj dum la semajna aranĝo okazis intervjuoj. Ĉiutage aperadis kongresa kuriero “La Saltejo”, per kiu ni

povis ekscii pri diversaj programŝanĝoj, manĝmenuo, kaj aliaj aktualaĵoj. Ekzemple: ampleksan informon pri la ĵus pasinta ILEI-kongreso en Serbio, pri ĝiaj rezolucio kaj aktivado rivelis Mireille Grosjean.

La kongresa ĉeftemo estis: “Vivanta naturo, floranta kulturo”, kiu estis abunde pritraktata. Pri Finnlando okazis multaj programeroj. Oni parolis pri ekesto de la lando, pri la demokratio, estis prezentitaj Sameaj minoritataj lingvoj, eblis lerni la finnan lingvon eksprese, okazis kelkaj laŭtemaj ekskursoj. Prelegoj temis pri “Finna naturo”, pri “Edukstemo” kaj pri “Politika vivo en Finnlando”. Oni parolis pri Esperanto-historio de Lahtio. Nacia vespero okazis en belega teatro. En bankedo oni gustumis finnajn specialaĵojn.



Okazis pluraj posttagmezaj artaj programeroj en kiuj prezentiĝis diversaj kantistoj kaj muzikgrupoj. Ni spektis koncertojn de Manŭel, Martin Wiese kaj de Ĵele. Vespere plezurigis nin la kantgrupo Sepa kaj Asorti, Kajto kaj JoMo. Impresis la teatraĵo “Vivo de Galileo” prezentata de Saŝa Pilipović, kiu ankaŭ kantis ciganajn kantojn. La Litova grupo Asorti muzikis ankaŭ dum la balo.

Estis elektita nova estraro. Duncan Charters, el Usono, elektiĝis prezidanto. Vicprezidantoj estas: Jorge Maia el Brazilo kaj Huang Yinbao (Trezoro) el Ĉinio. Ĝenerala sekretario Alex Kadar el Francio. Kongresojn, kulturon, eldonadon, terminologion prizorgos Orlando Raola el Usono. Pri Afriko kaj Aktivula Maturigo okupiĝos Jérémie Sabiyimva el Burundo, pri Azio kaj Oceanio So Jinsu el Koreio kaj la sciencan kaj fakan



agadon prizorgis Amri Wandel el Israelo. Akademianoj elektis novan sekretarion-François Lo Jacomo el Francio.

Samtempe kongresis blinduloj. En enirhalo ni povis admiri foto-ekspozicion pri Kroatio: La lando de mirinda naturo. Kanadaj samideanoj prezentis la venontan kongreson en Montrealo al kiu jam aliĝis surloke 80 gesamideanoj, kio estas rekorda nombro.

La libroservo ofertis multajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis paroligaj lecionoj kaj konkurso pri publika parolado. Ne mankis aŭtoraj duonhoraj. Ĉiu kongresano ricevis la libron Kalevala-finna nacia epopeo. Ĝi estis donaco de la finnlanda E-asocio. Oni omaĝis la faman islandan verkiston Baldur Ragnarsson. Kunvenis juristoj, fervojistoj, pedagogoj, mondciivitanoj, ĵurnalistoj, medicinistoj, nefumantoj, ekologiistoj, vegetaranoj, sennaciistoj, matematikistoj kaj aliaj homoj el diversaj organizaĵoj. Fondiĝis asocio de Te-amantoj. Futbal-matĉon ĉi-foje gajnis esperantista teamo je 5:2.



Ĉiutage okazis ekskursoj tra la urbo kaj al proksima ĉirkaŭaĵo. Merkredaj tuttagaj ekskursoj ebligis al la kongresanoj viziti la ĉefurbon Helsinko kaj Tampere, kie okazis la UK antaŭ 24 jaroj.

La ĉi-jara internacia vespero estis brila. Ni spektis lumludadon, plurajn dancojn, kantojn, spritaĵojn. Ĉe la fino kantis

internacia koruso. La fermon de la kongreso efektivigis la nova prezidanto Charters Duncan. Oni dankis al la antaŭa estraro, kiu promesis kunlabori plu. Estis legata la rezolucio de la kongreso, surekrane aperis bondeziro de la sveda ministrino pri kulturo. Prezentiĝis la infanoj kaj adoleskantoj de la Kongreseto. Ĉe la fino estis transdonita la flago al la kanadaj kolegoj. Dankoj apartenas al ĉiuj kiuj preparis la ĉi-jaran

104-an Esperanto-kongreson.

Liba



Tuttaga ekskurso al du subĉielaj akvo-vojoj

Vääksy kaj Kalkkinen

Pluraj tuttagoj ekskursoj estis proponitaj por merkredo. Jen ebleco ĝui la belan naturon de Finnlando kun multaj lagoj, insuloj kaj insuletoj kaj eĉ ŝipveturi.

La unua celo estis vizito al muzeo Päijänne en Asikkala. Eblis tie malkovri plej diversajn ilojn por fiŝkaptado kaj ankaŭ multnombrojn fiŝo-speciojn. Ekstere la naturo invitis al ripozo kaj admiro.

Asikkalan
Jääkausitie

TASOKAS
HUUTOKAUPPA
NIKKAROISTEN
PAPULA
KE 24.7. klo 18



En Vääksy troviĝis kanalo inter du lagoj kaj kluzo, tie ni atendis la ŝipon, kiu malrapide eniris la kluzon.

Tuj post la enŝipiĝo eblis tagmanĝi ĉe la memserva tablo. Ege bongustis la fiŝetoj laŭ malsamaj preparaĵoj.

Dume la ŝipo navigis sur belega lago kun mirinda naturo. La agrabla vetero favore helpis por ĝui la pejzaĝon.

Ni direktiĝis al Kalkkinen, tie en la bieno de Viini kaj Puutarhatila Pihamaa, eblis gustumi vinon faritan el fragoj.

Apude troviĝis vasta frago-kampo. La fragoj kreskas tie de fino de majo ĝis fino de julio.



Iam la buso veturis kvazaŭ meze de la lago Päijänne, fakte sur la terkresko Pulkkilanharju, kiu longas 8 km. Tie ŝajne troviĝas la plej uzata akvovojo por libertempa boatado en Finnlando.

Nia fina celo estis vizito al loka malnova muelejo, tie oni muelas ĉefe sekalon.

Andreo



Tuttaga ekskurso al la landlima urbo Gorizia-kaj Nova Gorica.

Okaze de Itala Kongreso en Trieste estis proponitaj preskaŭ ĉiutage ekskursoj. Jen unu el la tuttagaj ekskursoj de merkredo al tiuj du urboj, kiuj troviĝas respektive en Italio kaj en Slovenio.




Nia unua vizito estis al la kastelo de Gorizia. Ĝi estis konstruita ĉirkaŭ la jaro 1001, sur altaĵo de la urbo Gorizia. De supre eblas admiri belegan panoramo al la urbo kaj ĉirkaŭaĵo.

La nuna aspekto ne respektas la antikvan fotikaĵon, kiujn la venecianoj detruis.

La kastelo montras la evoluon de la 13a ĝis la 16a jarcento. En la salono estas ekspoziciataj diversaj artaĵoj, malnovaj muzikiloj, vestaĵoj, armiloj, mebloj.

Poste estis proponite viziti la sinagogon. Tie ni ricevis multajn klarigojn pri la iama situacio de la juda komunumo, kaj ties historia evoluo, pri la celo de sinagogo, kiu estas ne nur preĝejo sed ankaŭ edukejo kaj kunvenejo.



Por la tagmanĝo la tuta grupo troviĝis en vasta restoracio kun ege bongustaj vinoj kaj

manĝaĵoj.

En la posttagmezo ni vizitis la palacon Coronini Cronberg. Ĝi estis la historia rezidejo de tiu familio. Inter la 15 salonoj, troviĝis la ĉambro, kie mortis Karolo la 10a el Burbona Familio.

Nia lasta vizito estis al la Placo Transalpa. Tie troviĝis la iama landlima muro inter Italio kaj Slovenio. La 1an de majo 2004 Slovenio eniris la Eŭropan Union, pro tio jam ne troviĝas la muro sed simbola strio inter la du landojn kaj ankaŭ inter Gorizia kaj Nova Gorica.



La stacidomo en Nova Gorica (Slovenio)



Jen la linio, kiu montras la pozicion de la antaŭa landlima muro. Ambaŭ-flanke de la muro-parto troviĝas la skribo "Kune en Eŭropo 1a de majo 2004"



Nia grupo en Slovenio fotita de Italio

Ĉi-somere okazis pluraj renkontiĝoj, kongresoj en Eŭropo. Jen pliaj fotoj pri ili.

En litovio en Panevėžys: BET-55



**En Serbio en Ĉaĉako
ILEI-kongreso**

**Tuj poste en Finnlando
en Lahtio UK-104**



**Fine de aŭgusto okazis la
Itala kongreso en Triesto**

